

Numero: 310.  
Marto: 2018.

26-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

# Printempo

Marto estas la unua printempa monato. La martaj sunradioj kare karesadas nian vangon kaj agrable promeni en la parko kaj aŭskulti la gajan pepadon de la birdetoj.

Printempe ĉio renaskiĝas kaj nia animo pleniĝas kun espero kaj kredo. Ni faras novajn celojn. Ni revadas, ke nun en tiu ĉi jaro ĉio estos pli bona kaj pli bela.

Ni ofte rigardas prospektojn kaj sonĝas pri someraj vojaĝoj kaj ferioj.

Grandparte Esperanto-aranĝoj, renkontoj, kongresoj okazas en la someraj monatoj, sed ni jam nun planas partopreni iun.

Ni ŝatus, se ankaŭ nia lingvo Esperanto fariĝus vera helpilo de la homaro kaj per ĝi multaj diverslingvaj homoj komprenus unu la alian.

Por mi estas nekomprenebla, kial oni rifuĝas de Esperanto, kiam ĝi jam plurfoje kaj sur ĉiu tereno pruvis sian vivkapablon.

Esperanto estas neŭtrala lingvo, Ĝi ne minacas la kulturon kaj lingvon de malgrandaj nacioj.

Paralele kun ĝi oni povas lerni ankaŭ aliajn lingvojn.

Se ĝi estus enkondukita en lernejojn kiel fremda lingvo, la gelernantoj povus ŝpari multe da tempo, ĉar Esperanto estas facile ellegnebla.

Mi tre esperas, iu printempa venteto forbalaos la malbonajn pensojn kontraŭ la zamenhofa lingvo kaj kiel neĝborulo ekaperos nova komenco de la vivo de la lingvo.

Homoj amase lernos ĝin kaj Esperanto vere fariĝos la dua lingvo de la homaro.

En ĉiu printempo ennestiĝas nova espero en mian koron kaj kredas, nia amata lingvo meritos la estimon de multaj homoj.

Grave, ke ni geesperantistoj kredu, Esperanto estas bonega komunikilo kaj ĝi plifaciligas la homan vivon sur la terglobo.

Printempe oni plantas en la ĝardenoj kaj el tero elkreskos belegaj floroj kaj diversaj kreskaĵoj.

Mi proponas, ankaŭ ni semu kaj semu nelaciĝante! Eble iam en la granda ĝardeno de la homaro ekaperas admirinda floro, nomita ESPERANTO.

— Redaktanto —



# En vagonaro

Esperantisto vojaĝante per vagonaro al iu urbo enue rigardis la pejzaĝon. Estis posttagmeze kaj la monotona bruo de la vagonaro dormemigis lin.

Prefere li estus dormanta, sed li deziris rigardi ankaŭ la forkurantajn kampojn kaj arbarojn.

Ĉe iu stacidomo la vagonaro haltis. La pasaĝeroj el kaj envagoniĝis. Li aŭdis la fajfadon de la konduktoro, ke la vagonaro povas ekiri.

Venis novaj pasaĝeroj. Ili rapide serĉis sidlokon. Estis kiuj tuj ekparolis unu kun la alia.

Lin ne interesis pri kio ili babilis. Ĝenerale ili babilis pri bagatelaj aferoj.

Li apenaŭ rimarkis, ke iu juna viro eksidis apud lin. La viro demandis nenion. Li nur sidis longtempe senmove iomete ĝene.

Eble pasis kvaronhoro, eĉ pli, kiam li ekparolis. El la parolo la esperantisto komprenis nenion. La novalveninta pasaĝero parolis angle. Ion li deziris demandi. Plurfoje li ripetis la demandon.

En la mano li prenis vojaĝbileton. Ŝajne li deziris peti informon de la kunvojaĝantoj.

— Kion vi volas? — demandis iu pasaĝero en hungara lingvo kaj dume li gestadis per sian manoj, kvazaŭ per ili la viro volus komprenigi la hungarlingvan parolon.

Neniu komprenis la eksterlandan pasaĝeron. En la vagono neniu sciis la anglan lingvon krom junulo, kiu estis tute komencante kaj konis nur kelkajn esprimojn. Fine eble pro la malbona prononco la eksterlandano ne komprenis lin.

La esperantisto rigardis la fremdan pasaĝeron, kiuj mane kaj piede volis peti helpon de la kunvojaĝantoj. Li abrupte rimarkis etan, verdan stelon sur la pulovero de la viro.

Lia koro ekpulis. Li ankoraŭ ne renkontis eksterlandan esperantiston, kvankam li jam delonge estas la adepto de la Internacia Lingvo.

Li tuj eksaltis kaj brakumis la eksterlandanon je la miro de la aliaj pasaĝeroj. Li feliĉe ekkriis:

— Estu salutate, samideano! Mi staras je via dispono.

Ankaŭ la eksterlandano surpriziĝis, sed en la sekva momento gaje manprenis, kvazaŭ ili estus konantoj aŭ amikoj delonge.

Dank' al la verda stelo, en la vagono ĉesis la lingva problemo. La du diverslingvaj homoj povis paroladi senĝene.

La vagonaro kuregis plu kaj malfermiĝis antaŭ ili la estonto.

— Ŝaŝa —

**Apáti Kovács Béla**

# Sonĝo



Andreo enlitiĝis frue. Apenaŭ pasis la oka horo vespere. Alitage li ĉiam enlitiĝis preskaŭ noktomeze eĉ pli malfrue.

Li tuj endormiĝis. Ankaŭ tio ĉi estis tre stranga. Ĉiam li endormiĝis malfacile kaj li longe turniĝadis en la lito serĉante la konvenan lokon por la dormo.

Li havis strangan sonĝon. Ĝi kvazaŭ estintus realeco. Matene vekigante li ne povis liberiĝi de la sonĝo. Dum la tuta tago ĝi akompanis lin. Ion ajn li faris la sonĝo estis kun li. Andreo provis forgesi ĝin, sed li ne povis.

Li sonĝis pri granda, verda kampo, kie li estis sola. Vane li ĉirkaŭrigardis, vidis neniun krom la flora kampo. Ĉie estis floroj, kiujn ankoraŭ li ne vidis.

Li volis deŝiri floron kaj en la sekva momento el ĝi fariĝis belega junulino. Ŝia longa, blonda hararo flagris en la venteto kaj ŝiaj bluaj okuloj brilis, kiel la maro en somero. La junulino surportis travideblan, silkan robon, kiu suspektigis perfektan formon de ŝia korpo.

La vidaĵo paralizigis Andreon. Li nur staris senmove kaj rigardis ŝin.

Fine li konfuzite demandis:

— Kiu vi estas belega knabino?

La junulino ne respondis. Ŝi nur ridetis.

— Ĉu vi estas muta? — demandis denove Andreo.

— Mi demandis, kiu vi estas?

Vane li atendis la respondon, la junulino nur ridetis. Ŝi tute ravis lin.

Longe ili staris vidalvide unu al la alia. Andreo plurfoje volis demandi ion de ŝi, sed ĉiufoje li ne ricevis respondon. Poste li signis al la junulino, ke sekvu lin.

Ŝi obeis kaj ili ekiris. Verdire li ne sciis, kien iri? Li nur iris rekte kaj la junulino sekvis lin, kiel fidela hundeto.

— Almenaŭ diru al mi, kie mi estas? — petegis Andreo. — Ĉu mi iras en ĝusta direkto? Kie mi trovos urbon aŭ vilaĝon.

Kompreneble la junulino ne respondis, eĉ unu vorto ne forlasis ŝian buŝon.

Tio ĉi ege ĝenis Andreon. Li ne komprenis, kial ŝi ne respondas al liaj demandoj.

La kampo estis senfina. Vane li plirapidigis siajn paŝojn Andreo ne vidis ĝian finon. Ĝi similis al oceano. Li estis sur ĝi malgranda velŝipo.

Kien li rigardis ĉie estis belaj floroj. Ili estis diverskoloraj.



Andreo denove turnis sin al la junulino:

— Malkaŝu al mi, kiel vi naskiĝis el floro? Ĉu vi havas gefratojn, gepatrojn kaj familianojn.

La florfraŭlino haltis kaj proponis al Andreo deŝiri alian floron. Ĉion ŝi montris per siaj neĝoblankaj manoj.

— Ĉu mi deŝiru floron? — li demandis scivole kaj li ĵetis rigardon al ŝi.

En la sekva momento la junulino signis per sia kapo, jes.

Andreon tiklis la sekreto, ĉu la aliaj floroj estas homaj estaĵoj?

Malgraŭ tio li timis deŝiri alian floron. Li paŝadis singardeme kaj provis eviti, ke li surpaŝu ilin.

Almenaŭ la junulino povus paroli. Sed ŝi silentis. Vane li demandis ion, la respondo ĉiam estis nur mistera rideto.

Andreo haltis kaj kliniĝis por deŝiri floreteton. Lia mano tremis. En la lasta sekundo li retiris ĝin. Fine li ne kuraĝis deŝiri. Li stariĝis kaj denove ĵetis rigardon al la junulino.

— Mi ne scias, kien iri — li diris. — Bonvolu helpi min!

La junulino montris per sia fingro rekte en la malproksimon.

Andreo plirapidigis la paŝojn kaj la junulino apenaŭ povis sekvi lin.

— daŭrigota —



# Poezio

**ADY Endre** (naskiĝis la 22-an de novembro 1877 en komunumo Érindszent (rumana nomo: **Ady Endre**, mortis la Budapeŝt 27-an de januaro 1919) estis unu el la plej grandaj hungaraj poetoj. Dum la unua mondmilito li loĝis en Csucsá.



Fonto:  
([http://www.babelmatrix.org/index.php?page=authorPage&interfaceLang=hu&literatureLang=hu&translationLang=all&auth\\_id=117&doc\\_id=0&doc\\_lang=eo&official=1&bio=true](http://www.babelmatrix.org/index.php?page=authorPage&interfaceLang=hu&literatureLang=hu&translationLang=all&auth_id=117&doc_id=0&doc_lang=eo&official=1&bio=true))

## La lasta rideto

Oh, mi vivis tre malbele,

Oh, mi vivis tre malbele:

Kia bela mortinto mi estos,

Kia bela mortinto mi estos.

Mia satira vizaĝo plibeligas,

Mia satira vizaĝo plibeligas:

Rideto estos en mia lipo,

Rideto estos en mia lipo.

En mia vitrumita, granda okulo,

En mia vitrumita, granda okulo:

Io en ĝi brilas,

Io en ĝi brilas.

Mia rideta, malvarma lipo,

Mia rideta, malvarma lipo:

Li dankas vian kison,

Li dankas vian kison.

Sipos Ferenc Norbert



## Sur la hungara Ugaro

Mi vadas sur sovaĝa pejzaĝo:

Sur praa abundkreska tero.

Mi scias ĉi tiu sovaĝan kampon,

Ĉi tiu estas la hungara Ugaro.

Mi klinigas al la sanktan humon:

En ĉi tiu iu maĉas tero.

Hej, alta herbaĉo,

Ĉu ĉi tie ne estas floro?

Sovaĝaj volvokrampoj min ĉirkaŭas,

Dume mi dormantan animo de tero gvatas,

Odoro de maljunaj floroj

Amante Narkotas.


Silento estas. La herbaĉo, la setario,

Detaras, dormigas, kovras la herbaĉo

Kaj blovas ridegan venton

Super la granda Ugaron.

Sipos Ferenc Norbert



# Por infanoj



## Ŝafisto

— hungara popolfabelo —

Iam vivis ŝafisto, kiu saĝe scipovis respondi al ĉiu demando kaj lia famo estis konata en malproksimaj landoj.

Sciiĝis pri li ankaŭ la reĝo, sed li ne kredis tion.

— Ĝi estas nur klaĉo. Mi ne kredas, kion oni parolas pri li – diris la reĝo, kiam iu menciis la saĝecon de la ŝafisto.



Sed la korteganoj tiom multe parolis pri li, ke fine la reĝo cedis kaj li vokis al si la ŝafiston.

— Respondu al mi trifoje ĝuste – li diris. – Se vi respondos bone, mi adaptos vin je mia filo kaj vi loĝos ĉe mi en la palaco. Sed se nur unufoje vi eraras, vi reiros al viaj ŝafoj.

— Mia reĝa Moŝto, mi akceptas vian proponon – respondis la ŝafisto.

Fariĝis granda silento en la tronejo. Tiom granda, ke ankaŭ la zumado de la muso estis aŭdebla.

La reĝo demandis la unuan:

— Diru al mi, kiom da akvero estas en la maro?

— Mia reĝa Moŝto, mi havas peton, bonvolu bari ĉiujn riverojn, kiuj fluas en la maron, por ke mi povu nombri, kiom da akveroj estas en ĝi!

— Vi respondis bonege. Mi estas scivola, ĉu vi scias ankaŭ la duan? Ĉu vi scipovas diri al mi, kiom da steloj estas sur la firmamento?

— Mia reĝa Moŝto, tuj mi diras tion, sed unue portigu al mi paperon

La servistoj portis rapide la paperon kaj dume ili ridis, ĉar ili pensis, la ŝafisto deziras kalkuli sur ĝi, kiom da steloj estas sur la firmamento.

Sed la ŝafisto ne kalkulis sur ĝi. Li prenis la paperon li plendesegnis ĝin je etaj nigraj punktoj. Sur ĝi estis tiom multe da punktoj, ke kiu vidis ĝin, ties okuloj estis ravitaj. Kiam li finis la desegnon, li trandonis al la reĝo:

— Tiom da steloj estas sur la firmamento, kiom da punktoj estas videblaj sur la papero. Bonvolu nombri ilin!

La servistoj ege ektimis. Fine la reĝo ordonos al ili nombri la punktojn.

Al la reĝo tre plaĉis la respondo. Sekvis la tria demando.

— Filo mia, diru al mi el kiom da minutoj konsistas la eterneco?

La ŝafisto iomete cerbumis kaj poste li respondis:

— Malproksime en Promenio+ estas fama diamantomonto, kiu estas tiom granda, ke oni laciĝas ĝis oni ĉirkaŭiras ĝin. Birdeto flugas sur tiun monton en ĉiu centa jaro kaj ĝi akriĝas sian bekon. Kiam la tuta monto eluziĝas, tiam la unua sekundo forpasas el la eterneco.

— Bone – diris la reĝo – vi ĉiufoje respondis ĝuste. Saĝuloj ne sciintus respondi pli bone, ol vi. Ekde hodiaŭ tiu ĉi palaco estos via hejmo kaj vi fariĝos mia filo.

— tradukis: Apáti Kovács Béla —

(+ Promenio estas la nomo de fantaziolando)



# Fantazio

# Fantazio

